# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo aprilo 2023**


## EKSPOZICIO POR LA NOKTO DE LA LIBROJ

Madrida Esperanto-Liceo estisdenove invitita partopreni la Nokton de la Libroj, organizatan de la Madrida regiona registaro, ĉirkaŭ la tago de la libro, en aprilo.

Ni profitos la datrevenon de la mort(ig)o de la ĉilia poeto Pablo Neruda por prezenti ekspozicion de libroj de latinamerikaj verkistoj tradukitaj al Esperanto. La dato estos la 21a de aprilo, inter la 18,30 kaj 20,30. La loko estos la sidejo de la Liceo, en strato Rodríguez San Pedro, 13. Vi ĉiuj estas invitataj, kaj ni rekomendas ke vi invitu amikojn kaj simpatiantojn. La aliro estas malferma kaj estos anoncata en la retejo de la iniciato.

## LEGADO DE DONKIĤOTO

Ankaŭ en tiuj tagoj, Esperanto denove partoprenos en la sinsekva legado de la verko Don Quijote,organizata de la Círculo de Bellas Artes. Nia vico estas antaŭvidata por la 20a de aprilo, je la 20,45 horoj, en ties sidejo.

Kiel en pasintaj jaroj, ni havos du vicojn por legi paragrafon de la verko. Se vi neniam partoprenis, ni invitas vin anonciĝi ĉe la Liceo, ĉar, kiel en aliaj okazoj, novuloj havos prioritaton por tiu legado. Aŭ se vi simple volas akompani nin, atendu nin ĉ. la 20,30 horo en la halo de tiu kulturinstitucio.

## MIGUEL FERNÁNDEZ PRI LORCA, EĈ DUFOJE

Dum la semajnfino de la 25a kaj 26a de marto Miguel Ferández partoprenis en du prezentadoj omaĝe al Federico García Lorca, okaze de la 125a datreveno de ties naskiĝo. Oni invitis lin je la prezentado de mallonga filmo “La camisa blanca” (La blanka ĉemizo), reĝisorita de Bego Guerrero, pri la vivo kaj morto de la poeto. La sabaton 25, vespere, li partoprenis kunbabiladon (*tertulia*) en la Ateneo de Madrido. La 26an la loko elektita estis la Fondaĵo Anselmo Lorenzo, de la sindikato CNT.

Miguel estis prezentita en ambaŭ kazoj kiel esperantista poeto kaj tradukisto de Lorca al la internacia lingvo. Jen bela ekzemplo de *elkatakombigo*.




## SOLENA FERMO DE LA KONKURSO DE DEBATO EN FUENLABRADO

La 29an de marto estis fermita la konkurso pri debato en Fuenlabrado (parto de pli ampleksa rondo inter lernejoj en la municipoj de la suda zono de la madrida regiono), pri kiu ni informis en pasintaj numeroj, kaj kiu temis pri la rolo de Esperanto en la Eŭropa Unio. La debato evidentiĝis tre altnivela, kun granda laboro de la lernantoj kaj instruistoj enplektitaj.

La konkurson gajnis la Centro Salvador Dalí, kiu cetere estis la lernejo profitinta el la helpo de nia juna amiko Jorge Brasal, post ilia peto al la esperantistaj asocioj.

La disdonon de premioj ĉeestis la sekretario de Hispana Esperanto-Federacio, Manuel Parra, kaj la direktoro de Fondaĵo Esperanto, José Antonio del Barrio, kiuj parolis al la ĉeestantoj por gratuli la partoprenintojn, kaj por danki la iniciaton de la urbestraro. HEF ricevis kunmemoran donacon, fare de la skabeno de edukado, Isidoro Ortega.






## VIZITOJ AL LA ARKEOLOGIA MUZEO

En nova kultura agado, la 31an de marto, grupo de 15 esperantistoj kaj amikoj ĝuis gviditan viziton al la ĉambroj pri Antaŭhistorio de la Nacia Arkeologia Muzeo.

Ni ripetos la sperton denove ĉimonate, konkrete la 13an de aprilo je la 16,30, por viziti la ĉambrojn pri la Romia Hispanio. Bonvolu anonci vin ĉe niaj adresoj niavocho@gmail.com aŭ madrid@esperanto.es, kaze ke vi estas interesataj. Kiel ĉiam, memoru ke vi povas inviti amikojn kaj simpatiantojn, sed esperantistoj havos prioritaton.

## KUNVENOJ KAJ RENKONTOJ

Ni rememorigas ke ni rekomencis la renkontiĝojn en la sidejo, ĉiujn lundojn ekde la 18,30 horo. Ni proponas komunajn paroladojn, legadojn kaj deklamadojn.

Ankaŭ la grupo de Fuenlabrado, Fuenlabrada Esperanto-Ligo, rendevuas ĉiujn ĵaŭdojn, ĉirkaŭ la 6a vespere, en sia sidejo, en la CEPA Paulo Freire (metrohaltejo "Fuenlabrada Central")



La kutima unuasabata rendevuo okazos la 1an de aprilo denove en la polpejo *Pulpería O Miño*, en la strato Esperanto, n. 2, de Madrido (metro-stacio Alsacia, lineo 2). Jen apude foto de la plej lasta renkonto.

Memoru ke ĉiuj estas bonvenaj al la renkontiĝoj, sendepende de la nivelo de la lingvokono.

## PLIAJ INFORMOJ

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com